

& La kripla Pegazo:

< Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 598 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis K. Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per modifo de sveda popolmelodio el Retviko (Rättvik) kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/do MiFa ReFa Mi DoMi SoSo; So doTi redo do LaFa SoSo;

(#Rekantaĵe: So doTi dore do; LaFa SoFa MiFa SoFa ReTI Do o)

)×26)+

(&Strofoj:

'1 Porko malsata sonĝas pri glano, ;
Dolĉajn bombonojn sonĝas infano.

(×: **Li revas pri sukces' ; En la
granda mondo regas la forges'.**)

'2 Esperantisto sonĝas pri rimoj. ; Ve,
de la sonĝo venas la krimoj.

'3 Krimoj de rimoj, verŝoj de versoj, ;
Sur la Parnaso grandaj renversoj.

'4 Fulmas la kapo hirte, senkombe, ;
Ĉiu poeto turnas sin tombe.

'5 Kun la Vortaro Sankta de Rimoj ; Li
al ĉielaj altmalproksimoj

'6 Rajdas fiere sur la Pegazo. ; Lin bela
Muzo gvidas — ĉe nazo.

'7 Svarmas en versoj novaj belecoj, ;
Granda amaso el ĉiuj specoj:

'8 Li al la frazoj kolon eltordas, ; Kaj la
finaĵojn simple demordas.

'9 Pri la printempo, vintro kaj vento, ;
Sepdeksefoje pri l' Nova Sentto,

'10 Pri Ŝi, la Kara, kiun li amas: ;
Versoj trumpetas, marŝas — kaj lamas.
.....

'11 Ĉion li movas, ĉion li provas, ;
Gloron eternan li por si kovas.

'12 Rompas la ovon, rampas la ido ; El
la ovŝelo — estas ĝi: rido.

'13 Ĉar ja la homoj, granda bedaŭro, ;
Metas foliojn sanktajn de laŭro,

'14 Ve, ne sur lian kapon glornoman, ;
Prefere — en la supon terpoman.

'15 Oni, senhonte, jen, eĉ kritikis! ;
Hoko de moko akre lin pikas,

'16 Diras kritiko, la serpentsibla, ; Lian
Pegazon fajra — sed kripla.

'17 Kaj liajn rimojn diras ĝi surdaj, ;
Kaj la ariojn diras ĝi gurdaj,

'18 Kaj lian voĉon diras ĝi raŭka, ; Kaj
la poeton diras sentaŭga.

'19 Jes, je l' adreso de la poeto ; Venas
sciigo en la gazeto:

'20 "Viaj versaĵoj — havu kuraĝon — ;
Estas tre taŭgaj — kovri fromaĝon.

'21 Sed post ĉi tiu akra atenco ; Ĉesas
jam en li la pacienco

'22 Kaj li eksplodas, kiel per briko ;
Forte batita gala veziko:

'23 Kiel ekzistus verso ja bona, ; En
Esperanto, la malbonsona,

'24 Tio ja estis tute malsprita: ; Versi en
lingvo fuŝfarita.

'25 Kaj li riproĉas, plendas kaj ĝemas, ;
Krias, insultas, muĝas, blasfemas,

'26 Hurlas, malbenas, tondras sen
brido, ; Kaj furioze — iras al Ido.)